

NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

SEPTEMBRO-OKTOBRO 2004

ESPERANTO EN ĴURNALOJ

"El Norte de Castilla", la plej legata ĵurnalo en Kastilio kaj Leono, aperigis tutpaĝan raporton pri Esperanto, sub la titolo "La pacifica lucha del Esperanto" koincidante kun la okazigo de la U. K. en Pekino. La artikolo, kvankam kun eraroj, estas interesa kaj certe ĝi altiris la atenton de multaj homoj kiuj pensis ke Esperanto jam mortis.

Merkrede, la 9an de junio, ĵus antaŭ la eŭropaj elektoj, aperis en la fama belga gazeto "La Libre Belgique", tutpaĝa anonco pri Esperanto. Pro la anonco estis intervjuitaj la Prezidanto de Belga Esperanto-Federacio kaj Mathieu Grosh, reelektita eŭroparlamentano.

"Diari de Tarragona" (2004-06-22) inkludis intevjuo al Luis Serrano, kiu akupiĝas pri la libroservo de HEF kaj organizas la Turismaj Semajnoj en Kaalunjo.

EKSTERLANDE

La 18an julio oni inaŭguris monumenton dediĉitan al Hispanio en la Parko de la Mondo, en la urbo Malbork (Pollando). Tie, iom post iom, oni starigas ŝtonajn monumentojn kaj arbojn dediĉitajn al diversaj landoj. Entute jam estas trideko da landoj reprezentataj. Kaj Parko de la Mondo iom post iom kreskadas kaj disvastigas la nomon de Esperanto internacie. La ŝtonego kun la vorto "HISPANIO", en Esperanto kaj en pola lingvoj, kaj la nomon de la arbo, ankaŭ dulingve, estas pagitaj kun financa helpo de hispanaj esperantistoj. Prezidis la inaŭguron la urbestro de Malbork kaj Augusto Casquero kiel reprezentanto de Hispanio.

BIOGRAFIO DE ZAMENHOF

Pedro A. Garrote jam finis sian laboron: li plene tradukis el Esperanto al la hispana la verkon de René Centassi kaj Henri Masson "La homo kiu defiis Babelon". Kelkaj kunlaborantoj jam reviziis la 12 unuajn ĉapitrojn de la hispana traduko, do, post nelonge, la libro estos preta por eldonado.

KONGRESOJ DE HEF KAJ DE EUROPA E-UNIO 2004 BILBAO

Kun ĉeesto de preskaŭ 300 kongresanoj sukcese okazis la 6^a Eŭrop-unia Esperanto-Kongreso en Bilbao de la 25^a ĝis la 29^a Aŭgusto. En la solena inaŭguro kiel ankaŭ en la fermo, en la modernega Palaco Euskalduna, estis plenemocie kantitaj "La Espero" kaj la Himno de Eŭropo. Kiel sintezo de ĝiaj laboroj, oni redaktis dokumenton kun la titolo "Rezolucio de Bilbao", kies tekston oni povas legi en la retpaĝo <http://lingvo.org/eo/4/908>

Samtempe okazis en Bilbao la 63^a HEF-Kongreso, kies plej rimarkinda trajto estis la tikla temo de la renovigo de la Estraro, nepre okazonta venontjare. Restas nedecidita la kongresurbo por 2005: oni parolis, konkretigante nenion, pri Valencia de Alcántara aŭ Guadalajara.

No vaj libroj prezentita dum la Kongreos: "El esperanto, lengua y cultura" de Antonio Valén; "La enigmo de la ar@neo" de Abel Montagut kaj la traduko de José M^a Sarasua de la verko de Pio Baroja "Susana y los ratones"

Kadre de la HEF-Kongreso, Toño del Barrio prezentis jenan raporton pri la agado de la CENTJARA DATREVENO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN HISPANIO:

Eldonado de la Granda Vortaro Hispana-Esperanto. Prelegoj pri movadhistoriaj temoj en internaj renkontiĝoj dum la Kongresoj de Valencio kaj de Bilbao.

Ni sendis komunikon al granda nombro da ĵurnaloj, faris tion unuafoje dum la monatoj de julio kaj aŭgusto 2003. La rezulto estis pozitiva: sekve de tiu kampanjo ni ricevis demandojn por informado el radiostacioj. Oni ripetis la informadon je la komenco de la jaro 2004, Sekve al tio venis invito por programo "Cita con Pilar" de Radio 1, dufoje (februaro kaj marto). Ankaŭ aperis tutpaĝa artikolo en "Diario de Burgos", je la 18a de februaro 2004, kun interesa mencio pri la loka historio.

Ni sendis komunikaĵojn al historiaj revuoj, pri la datreveno kaj pri la ĝenerala historio de la movado. Ni ne ricevis pozitivan respondon.

Ni sendis sciigojn pri la publikigo de la Vortaro al revuoj pri libroj. Ni nur ricevis, kiel rezulton, la enmeton de Fundación Esperanto en unu el la ĉefaj katalogoj eldonitaj el unu el tiuj revuoj.

Ni sendis komunikon al diversaj fondaĵoj, kiuj povus helpi aŭ kunlabori. Ni ricevis afablan respondon de kelkaj el ili, sed ne praktikajn proponojn de kunlaboro.

Ni petis subvenciojn (Kultura Ministerio, Europa Unio) sed ili estis rifuzitaj, sed tamen tio servis por trovi la kontaktojn por eblaj postaj proponoj.

Pere de la Fondaĵo Esperanto, profitante la anoniman donacon de vortaroj por publikaj bibliotekoj en urboj kie ne ekzistas movado, ni programis publikajn agadojn por tiu transdono, tiel ebligante la propagandon de la lingvo kaj la movado en Guadalajara, Santander; Toledo, Madrid, Burgos, Palencia kaj Orense.

La historia kunmemoro estis uzita okaze de aliaj "rutinaj" agadoj de la movado, kiel Expolingua, kie oni prelegis pri tiu kunmemoro.

Ni malfermis specialan fakon "Historio" en la HEF-retpaĝaro <http://www.esperanto-es.net>.

Sekve de la kontaktoj faritaj, ni havis okazon partopreni en la tradicia laŭta deklamado de Don Kihoto en la "Círculo de Bellas Artes" de Madrido, kaj en "Maratono de rakontoj" de Guadalajara (deklamado de rakonto en Esperanto, starigo de budo por vendo kaj elmonro de materialo, kaj organizado de seminario/kurseto pri nia lingvo)

KONKLUDOJ

1. La agado ne estis sukcesa el organiza vidpunkto. Kia ajn estu la kaŭzo, ĝi montras la limigojn por fari skipan laboron en nia organizaĵo.
2. La ĉefa rezulto venis el la ekstera informado. Tiu ĉi estas nur paŝo, kiu povas taŭgi por sekvi nepran vojon.
3. La interesiĝo de la nunaj movadanoj pri la historia trajekto de nia movado estas ne ĝenerala; nur parto de la samideanoj aktive interesiĝas pri ĝi.
4. Parton de la ekstera publiko ja interesas nia historio. Tiu ĉi plu povas esti interesa maniero aliri al aliaj instancoj.
5. La kontaktoj kun aliaj asocioj kaj organizaĵoj ne estas elĉerpitaj; oni ankoraŭ povas multe agadi tiurilate
6. Ni malfermis kontaktojn kun publikaj administradoj; eĉ se la rezultoj dum tiu ĉi jaro estis malgrandaj, estus domaĝe perdi la sperton kaj kontakton akiritan.

MONDA TAGO DE TURISMO

La 27an de septembro, Monda Tago pri Turismo, la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, organizis senpagaj_lectionoj de Esperanto kaj de hispana lingvo pere de Esperanto. La lecionojn gvidis Augusto Casquero de la Cruz, jaro kiu ankaŭ gvidis internacian Sesion "Lingvoj iberiaj, afrikaj kaj aziaj",

Ankaŭ la hispanaj esperantistoj venontjare festos tutlande la kvaran centjariĝon de la publikigo de la unua parto de la Kihoto.

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid